



## Enhavo

- Semajno de Internacia Amikeco (SIA)
- Programo de la kulturdomo Greziljono
- Kurso en la Eo-Centro Herzberg
- Aligitaj Membroj meritas plian atenton

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*Komunikado EKO 2019-03 sendita el Budapeŝto, la 20an de februaro.*

*Al: Komitato kaj Sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkröĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO

## Kiel festi la Semajnon pri Internacia Amikeco

Antaŭ ni la 51-a Semajno de Internacia Amikeco, kultura evento en nia E-komunumo, kiun ni ne rajtas forgesi. Eĉ se la nuntempa mondo kun la interretaj kontaktoj kaj kunlaboro malsimilas disde tiu de antaŭ jarcentduono. Hodiaŭ apenaŭ ekzistas esperantistoj, kiujn ne ligus fortaj reciprokaj kontaktoj kaj sento de komuneco. Eble do la interŝanĝado de porokazaj salutoj kaj bondeziroj – dum la lasta plena semajno de februaro - ne plu havas la saman signifon, kiel en la epoko de la perpoŝte interŝanĝataj salutkartoj. Tio estis la origina celo de la Semajno ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Semajno\\_de\\_Internacia\\_Amikeco](https://eo.wikipedia.org/wiki/Semajno_de_Internacia_Amikeco)). Tamen daŭre en la interhomaj rilatoj, por firmigi komunan identecon estas grave reliefigi kaj emfazi amikajn pensojn kaj sentojn.

Samtempe ni povas vastigi la ŝancojn, kiujn donas al ni tradicia Semajno por pli da „horizontalaj” kontaktoj kaj kunlaboro kaj reciproka pliriĉiĝado per informoj, kion ni faras por disvastigi Esperanton, kion ni faras por funkcii en niaj lokaj kaj landaj medioj kiel esperantistoj.

Pasintsemajne, la 13-an de februaro, pasis Monda Tago de Radio. Unesko proklaminte ĝin en 2011 atentigis pri la kreskanta populareco kaj rolo de radio en la interreta epoko pro la specifa enhavo de milionoj da stacioj, kiuj respondas al tre diversaj homaj interesiĝoj. La Eo-komunumo de 97 jaroj disponas pri Eo-lingvaj radioprogramoj kaj ankaŭ nun liveras dudekon da ili. Eĉ se nur retrorigarde dum la

Semajno eblas kunfesti ilian laboron. Eblas kuraĝigi ilin per porokazaj salutoj kaj mesaĝoj. Ankaŭ per la informoj, kiel la Semajno - ankaŭ dekoj da aliaj eventoj - estas la okazo ne sole ĝui la propran Eo-kulturon, sed ankaŭ radii pere de ĝi en la ekstera mondo.



Jam la 20-an fojon en 2019 en la daŭro de la Semajno pasas Tago de la Gepatra Lingvo, laŭvica okazo plenvoĉe prezenti nian starpunkton pri justa monda lingvopolitiko. Ĉirkaŭ la Semajno kaj la Tago de la Gepatra Lingvo fokusiĝu programoj en niaj kluboj kaj grupoj, dum kiuj ni bonvenigu ankaŭ neesperantistajn interesiĝantojn, partnerojn. La eventoj de la Semajno, la eventoj ĉirkaŭ la Tago de la Gepatra Lingvo bunte speguliĝu en niaj retpaĝoj, blogoj, fejsbukaj profiloj, en la Eo-elsendoj.

Sukcesan kaj Fruktoportan Semajnon !

Laŭ teksto de Barbara Pietrzak, Komisiito pri la Semajno de Internacia Amikeco

## Greziljono estas ankaŭ via domo. Vizitu ĝin iam en la sekvaj monatoj!

La kompleta programo por 2019 laŭ [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo)

- apr-12/16 : [Hora \(korusa\) renkonto](#) de *Interkant'* kun *Zdravka Bojčeva*
- apr-12/16 : [LandArt](#), Arto kaj Naturo en Greziljono kun *Nathalie Dubrulle*
- apr-26/maj-04 : 9a [PRINTEMPaS](#), intensivaj kursoj kun *Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein, Marion Quenut*
- maj-03/04 : 9a [PRINTEMPaS](#), internaciaj KER-ekzamenoj
- apr-28/maj-04 : Dua [Migra-promenada semajno](#) (en Esperanto) kun *Olivier Buisson*
- jul-08/18 : 3-a [Maratona Esperanto-kurso](#) dum 10 tagoj kun *Dennis Keefe, ....*
- jul-08/18 : 5-a [Interŝanĝoj](#) de scioj kaj faroj (franclingve)
- aŭg-06/16 : 9-a [Festa Semajno](#) por infanoj kaj familioj
- aŭg-06/16 : Dua Internacia [danco-semajno](#) kaj Esperanto-kursoj
- okt-26 / nov-03 : [8a AŬTUNE](#) la Esperanto-ferioj - kun halovena festo

Maison Culturelle de l'Espéranto

Adreso: Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, France

Retpoŝto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

Retejo: [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org) aŭ nur [gresillon.org](http://gresillon.org)

## Intensiva Eo-kurso en Herzberg am Harz, Germanio

**Esperanto-Kurso 18.03 (9-a horo) ĝis 22.03 (15-a horo)**

<http://esperanto-urbo.de> (multlingva)

Esperanto-instruado, biblioteko, muzeo je via servo:  
Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg  
D-37412 Herzberg/Harz - la Esperanto-urbo  
Grubenhagenstr. 6, Tel: +49/(0)5521-5983  
Urbo Herzberg <http://www.herzberg.de>



## UEA volas pli aktive rilati kun siaj Aligitaj Membroj

La Aligitaj Membroj estas tiuj, kiuj membras en Landa Asocio sed ne estas Individuaj Membroj de la tutmonda Asocio UEA. La okmilo da tiuj membroj formas potencialan kaj valoran cel-publikon. Ili parolas Esperanton, kaj sekve povus profiti el la servoj de UEA. Same profitas UEA mem, pro la rezultoj de varbado, kaj enmovada kaj ekster ĝi.

Revivigita propono estas pretigi modestan retan bulteneton por tiuj Aligitaj Membroj, kiuj deziras tion kaj pretas liveri nomon kaj retadreson. Ni pripensas pretigon de kvar bultenoj jare, ĉiu kun ĉ. la duona amplekso de la nuna komuniko.

Ni alvokas al niaj Landaj kaj Aliĝintaj Fakaj Asocioj por arigi la nomojn kaj retadresojn de tiuj el siaj Aligitaj Membroj, kiuj konsentas pri tio. Ĝenerale UEA havas tiujn informojn pri malmultaj el siaj Aligitaj Membroj. Sekvos post la nuna baza alvoko pli intensa kontaktado kun ĉiu Asocio.

Vortoj: 700

=====

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento nun tute ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj de UEA, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.